# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ helmikuu ◆ februaro ◆ 1/2015




## Vintraj Tagoj – Talvipäivät Tampereella 7.–8.3.2015, p. 6

◆ Profesoro Mustajoki estas nia gastpreleganto en la Vintraj Tagoj, p. 5
◆ Junulara E-Semajno 2014 en Germanio, p. 10
◆ Telma Rio de Janeirosta ja Bruno Turusta, p. 14

# ESPERANTOLEHTI

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 *eafgazeto@esperanto.fi*
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori 💻 *robog@gmx.de*
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* 💻 *maj-lis@maisanpaja.info*
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 💻 *eaf@esperanto.fi*
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300
**Kansi/Pärm/Kovrile:** Sur la dunoj. Foto: *Robert Bogenschneider*

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 💻 *eafprezidanto@esperanto.fi*
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 *paivi.saarinen@iki.fi*
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 *eafsekretario@esperanto.fi*

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 💻 *robog@gmx.de*
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *tiina.kosunen945@gmail.com*
*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. 💻 *arja.kuhanen@netti.fi*
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 *paula.niinikorpi@gmail.com*

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 💻 *tapani.aarne@mbnet.fi*
*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 💻 *esperarto@phnet.fi*
*Tuomas Latva-Pirilä*, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 💻 *tuomas.latva-pirila@suomi24.fi*

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *eafkasisto@esperanto.fi*
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo 💻 *eaf@esperanto.fi*

**Internet**: *www.esperanto.fi* ◆ *www.facebook.com/Finnlando* ◆ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

# Esperantujo en mondo de konfliktoj



En la verka momento, limdato de ĉi tiu numero de EL, estas antaŭan tagon farita interkonsento en la Belorusia ĉefurbo Minsk pri ĉesigo de la civila milito en Ukrainio. Kontrakto inter la Kieva registaro kaj orientukraina separatisma movado estis subskribita la 12-an de februaro sub garantio de Eŭropa Unio kaj Ruslando. Armita agado ĉesas laŭ la kontrakto meznokte inter sabato kaj dimanĉo, 14-a kaj 15-a de februaro.

Konflikto komencita antaŭ jaro kiel abolo de malpopulara registaro unuflanke kaj estigo de separatisma movado en la orienta parto de la lando aliflanke distranĉas ne nur landon, sed ankaŭ mondon. Partioj en civila, enlanda milito malofte estas nur enlandaj. Kion pri la tragedio de Ukrainio – miliona rifuĝado pro militagoj, preskaŭ sesmil mortintoj, inter ili eksterlandaj civiluloj en faligita aviadilo – estas klare, ke interesoj pli fortaj ol enlandaj intermiksiĝas. Kial? Oni ne agas sen intereso de profito. Kiu profitas pri uzado de armiloj? Tiuj, kiuj armilojn produktas, vendas, transportas, igas homojn armilojn uzi, detrui. Milito estas industrio, industrio profitigas siajn posedantojn. Militindustriistoj profitas senskrupule.

Kiam ni legas ĉi tiun gazeton, ni scias kiel finiĝis la dekkvara de februaro, Koramika Tago (tiel!). Raportoj disponeblaj kaj komentoj en amaskomunikiloj estas pesimismaj. Oni apenaŭ kredas je efektiviĝo de pafĉeso. Laŭ la interkonsentita kontrakto peza, longdistanca armilaro devas esti retirita ambaŭflanke je kvindek kilometroj. Por tio necesas ambaŭflanka fido.

El esperantista vidpunkto estas notinde, ke lingvan aspekton en la konflikto ties partioj forte emfazas. La lando estas oficiale unulingva malgraŭ granda, eĉ kvarona, ruslingva loĝantaro, precipe en oriento. Nacionalismoj, tiel rusa kiel ukraina, ”faras batalflagon” etnan kaj lingvan, kiel skribis Zamenhof antaŭ cent jaroj en sia *Alvoko al diplomatoj*. Sensciulo eventuale kredas al tia svingado de batalflago. Klerulo ĝin svinganta krimas.

Esperantistoj en Ukrainio kaj Ruslando suferas pro la konflikto deprimigan situacion malebligantan normalan rilatadon. En duoninsulo Krimeo tradicia maja studsemajno ”Aroma Jalto” ne povas tie okazi pro la Ruslanda anekso. Krimeon distranĉas landlimo. Studsemajno okazos, sed anstataŭe en Lviv en okcidenta parto. – La 67-a Internacia Junulara Kongreso okazis en 2011 en Kievo, kaj estis seriozaj planoj inviti Universalan Kongreson ĉi-jardeke tien. Nun tia ebleco ŝajnas ege neprobabla. Simile pri esperoj en Ruslandaj urboj inviti UK.

Plej teruraj civilaj militoj kaj enlandaj teroristaj agoj ekestintaj en nuna jardeko grupiĝas ĉirkaŭ Mediteraneo. Procezoj komencitaj kiel esperigaj revolucioj kontraŭ maldemokrataj reĝimoj plurloke ne sukcesis restabiligi, sed male splitigis.

La tiel nomata okcidento (”ni” – ni?) ne restas ekster konfliktoj. Tion oni spertis jarkomence en Parizo, kiam fanatikulo mortigis dekdu redakcianojn de franca satirmagazino. Konsentite, ke la blasfemado de tiu magazino estas klare ekster deco kaj bona gusto, sed prave, ke oni vaste reagis kontraŭ religia fanatikismo kaj por libereco de esprimo.

Zamenhof ne ŝatis nacionalismajn aŭ ajnajn fanatikajn batalflagojn. Nia flago ne tiras al glavo.

*Tuomo Grundström*

# Esploro kaj Dokumentado de Ivo Lapenna

(Postmorte eldonita en Zagreb 2014)

Tute freŝa estas en miaj manoj la verko ”Esploro kaj Dokumentado” de *Ivo Lapenna*. La libro estas eldonita okaze de la 60-jara datreveno de la Rezolucio favore al Esperanto akceptita en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo 1954. Redaktis ĝin *Birthe Lapenna* en Danlando. Grafike kaj teknike aranĝis la enhavon *Josip Pleadin* en Kroatio. La okazintaĵoj en la Esperanto-movado 1976–1987 formas la kvintesencon de la nova eldonaĵo.

Dum la legado miaj pensoj flugis en la pasintecon. La unuan fojon mi sekvis la festparoladon de Ivo Lapenna en Bruselo 1960. Ĝia ĉeftemo estis internacia humanismo. Poste mi povis plurfoje ripete tralegi ĝin en la verko ”Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj” (1966). Tre grava fonto por mi estas krome ”Memorlibro pri la Zamenhof-jaro” (1960), kiun redaktis prof. d-ro Ivo Lapenna.

Unika kaj neforgesebla estis la prelegvojaĝo de Ivo Lapenna printempe 1971 en finnaj universitatoj. Kiel liaj interpretisto kaj sekretario mi tre proksime povis sekvi tre fekundan kaj sukcesan agadon de nia ŝatata kaj prestiĝa gasto. Liaj ĉarmaj bonhumoro kaj afableco konkere venkis kaj kaptis ĉiujn partoprenantojn de la aranĝoj. Tre tikla tiutempe estis la prelego pri Internacijuraj problemoj de spacveturado. Ĵurnalistoj ne emis ĉesi siajn demandojn pri la temo en la gazetaraj konferencoj.

Tiuj agrablaj spertoj instigis min esplorfosi en la giganta verko ”Esperanto en Perspektivo” (1974) kun 844 paĝoj. Sekvis ”Eseoj memore al Ivo Lapenna” redaktita de *Carlo Minnaja*. Ni konas la meritojn de nia klarvida kaj vojmontra spirita gigantulo kaj kreinto de moderna UEA. Nun ni havas la dokumenton ED je nia dispono. Indas detale trastudi la enhavon. Konata eldiro substrekas la fakton *Audiatur et altera pars*. Multajn okazintaĵojn oni puŝis en ombron. Tial ni devas esti kontentaj, ke Birthe Lapenna kribris en la tagan lumon multajn al granda publiko nekonatajn aferojn. La stilo kaj voĉo de nia longtempa movada ĉefo estas kvazaŭ palpeble kapteblaj sur la paĝoj de la postmorte eldonita grava 221-paĝa dokumento.

Indas mencii, ke la arkivo de prof. d-ro Ivo Lapenna estas nun deponita en la Dana Ŝtata Arkivo en la koro de Kopenhago. Oni povas konstati, ke la verko de Ivo Lapenna parolas per si mem kaj estas avide studata ne nur nun sed ankaŭ – kaj tutcerte en la estonteco.

Kiam mi gratulas al Birthe Lapenna kaj Josip Pleadin pro ilia bone plenumita valora laboro, estas necese substreki, ke legontoj de ”Esploro kaj Dokumentado” trovos surprizajn aferojn, por multaj nekonatajn. Legado similas vojaĝon de esploraj veturistoj. Plej plaĉa maniero estas mem trankvile digesti la enhavon. Sincera voko venas jen: ek en la aventuron!

*Jorma Ahomäki*

## Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia 2015

- **7.–8.3. Vintraj Tagoj de EAF en** *Tampere*
- **14.–17.5. Sveda Kongreso en** *Upsala* **kun AMO-seminario**
- **4.–7.6. Somera kurso de EAF en** *Turku*
- **11.–19.7. La 10-a SES (Somera E-Studsemajno de lernu.net) en** *Martin*, **Slovakio –** *ses.ikso.net*
- **25.7.–1.8. La 100-a UK (Universala Kongreso) en** *Lille*, **Francio – karavano el Finnlando**
- **2.–9.8. La 71-a IJK (Internacia Junulara Kongreso) en** *Wiesbaden*, **Germanio**
- **12.–13.9. Aŭtunaj Tagoj de EAF en** *Lahti*

# Profesoro pri la rusa lingvo kaj literaturo Arto Mustajoki estas nia gastpreleganto en la Vintraj Tagoj en Tampere

Lia temo estas komunlingvo kiel ĝenerala fenomeno, pri ”lingua franca”; do ne pri iu aparta komunlingvo, ĉu planita, ĉu spontanee, ”nature” estiĝinta. Pri la ekvivinta kaj disvastiĝinta plan-komunlingvo li petas nin doni scion kaj vidpunktojn diskute pri la temo.

*Arto Mustajoki* verkas blogon finnlingvan kun diskutejo, pri kiu sube. Vidu ĝin:
*http://blogs.helsinki.fi/mustajok/about/*

Ankaŭ radioprogramo (finne) ”ses bildoj el la vivo de A.M.” povas vin interesi. Aŭskultu:
*http://yle.fi/aihe/artikkeli/2014/09/15/kuusi-kuvaa-arto-mustajoen-elamasta*



Arto Mustajoki

*Kirjoittelen kokemuksistani Helsingin yliopiston humanistisen tiedekunnan dekaanina, Suomen Akatemian hallituksen jäsenenä, tutkimus- ja innovaationeuvoston jäsenenä, Venäjä-tutkijana, kielitieteilijänä, kansalaisena, kuluttajana, junamatkailijana ja vaarina.*

*Blogeihin liittyviä kommentteja julkaisen mielelläni, en kuitenkaan nimettömiä enkä liian provokatiivisia.*

Mi skribas pri miaj spertoj kiel dekano de la humanisma fakultato de la Universitato de Helsinki, estrarano de Finnlanda Akademio, ano de Konsilantaro por esplorado kaj renovigo, esploristo pri Ruslando, lingvisto, civitano, konsumanto kaj avo.

Mi volonte aperigas komentojn en mia blogo, sed ne sennomajn nek tro provokajn.

## Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej mirindan urbon de Ukrainio!

Tie la unuan fojon okazos E-renkontiĝo ”**Mirinda Lviv-2015”** 1.–5. de majo 2015. Riĉa historia arkitekturo, multenombraj muzeoj, neforgeseblaj kafejoj, florantaj kreskaĵoj, proksimaj karpataj vidindaĵoj inspiros vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Lviv ĉiam allogas multajn homojn, kiuj strebas alten. Famaj verkistoj, poetoj, pentristoj vizitis tiun-ĉi ĉarman urbon, por krei siajn ĉefverkojn. Venu kaj komprenu, kial Lviv estas nepre vizitenda almenaŭ unufoje en la vivo, des pli en la gastama kaj amika Esperanto-etoso.

**Bonvolu noti, ke civitanoj de la Eŭropa Unio ne bezonas vizon por eniri Ukrainion!**

Vidu hejmapaĝon: *aromajalto.ukrainio.org.ua*
*Volodimir Hordijenko*, Kijivo:
tel. +38 (097) 4403172, *volodomir@ukr.net*

# Vintraj Tagoj – Talvipäivät Tampereella 7.–8.3.2015

**Kunvenejo**: Internacia funkcicentro
Suvantokatu 13, 33100 Tampere
***Kokouspaikka**: Tampereen kansainvälinen toimintakeskus,*
*Suvantokatu 13, 33100 Tampere*

## Programo – Ohjelma *(ŝanĝoj eblas - muutokset mahdollisia)*

**SABATO – LAUANTAI 7.3.**

**09.00–11.00** Kunvenoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj. Jarkunveno de ELFI je 10.30 *Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia. ELFIn vuosikokous klo 10.30*
**11.00–12.30** Lunĉo (proprakoste). *Lounas (omatoimisesti)*.
**12.30–13.00** Akceptejo malferma en la Internacia funkcicentro. *Ilmoittautuminen toimintakeskuksessa.* Suvantokatu 13.
**13.00–15.00** Malfermo de la Tagoj. Publika prelego finnlingve. *Päivien avaus. Prof. Arto Mustajoen yleisöluento: Lingua francat yleisenä ilmiönä.* Loko/*Paikka*: Nikolainsali, Tuomiokirkonkatu 27.
**15.00–15.30** Kafo/teo. *Kahvi/tee.* Suvantokatu 13.
**15.30–17.30** Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). *Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus)*.
**17.30–18.30** Libera kunestado. Libroservo malfermita. *Vapaata yhdessäoloa. Esperantotavaroiden basaari*.
**18.30–19.30** Vespermanĝeto. *Iltapala*.
**19.30–21.00** Vespera, kongrestema programo (memoroj pri la 80-a UK antaŭ 20 jaroj, pri la pasinta 99-a, pri la venonta 100-a en Lillo kaj la planita sekva UK en Finnlando). Muzikas ensemblo *SoilaFE. Iltaohjelmaa Esperanton maailmankongressien hengessä: (Tampere 1995, Buenos Aires 2014, Lille 2015 ja mahdollinen tuleva Suomen kongressi). Musisoi yhtye SoilaFE.*

**DIMANĈO – SUNNUNTAI 8.3.**

**09.00–09.30** Vizito al la ortodoksa preĝejo de Tampere (Tuomiokirkonkatu 27), gvidas *Jukka Laaksonen*. *Tutustuminen Tampereen ortodoksiseen kirkkoon.*
**10.45–12.00** Vizito en Tampere-halo.*Vierailu Tampere-taloon.*
**12.00–12.30** Piedirado al la muzea centro *Vapriikki*, adreso: Alaverstaanraitti 5. *Siirtyminen Museokeskus Vapriikkiin, Alaverstaanraitti 5.*
**12.30–14.00** Muzea centro Vapriikki, vizito en diversaj ekspozicioj laŭ propra gusto. *Tutustuminen museokeskuksen näyttelyihin omien mieltymysten mukaisesti.*
**14.00**– Adiaŭa lunĉo en la restoracio *Valssi* de la muzea centro proprakoste. *Päätöslounas Museoravintola Valssissa omakustanteisesti*.

**Bonan hejmenvojaĝon!** ***Hyvää kotimatkaa!***







# Vintraj Tagoj 2015

La venontaj Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos en Tampere, la 7-an kaj 8-an de marto 2015. La oficialaj kunvenoj okazos sabate kaj dimanĉe ni daŭrigos per pli neoficialaj programeroj.

La sabata kunvenejo estas la loka Internacia funkcicentro, en la adreso Suvantokatu 13 (ĉ. 300 m for de la fervoja stacio). Temas pri la komuna "hejmo" de pli ol 20 diversaj amikecaj societoj. Surloke estos librovendado de EAF kaj de la loka klubo Antaŭen. Posttagmeze okazos publika finnlingva prelego de prof. *Arto Mustajoki* pri lingva temo. Dum la jarkunveno de EAF ni ricevos trarigardon al la stato kaj proksima estonteco de la asocio. Post vespermanĝeto surloke ni daŭrigos per pli-malpli kongrestema

▶▶

# ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 7.–8.3.2015 (Internacia funkcicentro, Kansainvälinen toimintakeskus, Suvantokatu 13, Tampere)

**Nomo**: ______________________________

**Adreso**: ______________________________

**Tel./Ret-adreso**: ______________________

______________________________________

**Aliĝkotizo** (inkluzivas programon ambaŭtage kaj kafon kaj vespermanĝon sabate.):

42 EUR ................................ ĝis 20.2.2015 ____

50 EUR .............................. post 20.2.2015 ____

30 EUR por FEJO-anoj sub 30 jaroj.

Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.

Lunĉo dimanĉe en Museoravintola Valssi (16 EUR, supo 10,50 EUR):: _________

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj)

**Entute pagenda al la konto de EAF**: _________

**Pagoj al la konto:**
FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH

Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640** (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

**Pliaj informoj aŭ deziroj aŭ demandoj** (eblas sendi rekte al kontaktuloj): ________________

______________________________________

______________________________________

______________________________________

______________________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

**BONVENON!**

# ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 7.–8.3.2015 (Kansainvälinen toimintakeskus, Suvantokatu 13, Tampere)

**Nimi**: ______________________________

**Osoite**: ______________________________

**Puh./sähköposti**: ______________________

______________________________________

**Ilmoittautumismaksu** (sisältää viikonlopun ohjelmat sekä kahvin ja iltapalan lauantaina):

42 EUR................................20.2.2015 asti ____

50 EUR.........................20.2.2015 jälkeen ____

30 EUR FEJO:n varsinaisilta jäseniltä: ________

Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset.

Lounas sunnuntaina, Museoravintola Valssi (16 EUR, keitto 10,50 EUR): ______________

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää varten)

**Maksut yht. Suomen Esperantoliiton tilille: _________**

**Tilinumero:**

FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

**Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä** (voit lähettää myös suoraan yhteyshenkilöille)**:**

______________________________________

______________________________________

______________________________________

______________________________________

______________________________________

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse *eafmendoj@esperanto.fi*

**TERVETULOA!**





programo (memoroj pri la 80-a UK antaŭ 20 jaroj, pri la pasinta 99-a, pri la venonta 100-a en Lillo kaj la planita sekva UK en Finnlando). Intertempe muzikas la trio *SoilaFE*.

Dimance ni kolektiĝos en Tampere-halo por refreŝigi kongresajn memorojn, rigardos la betulon plantitan okaze de la kongreso, kaj poste daŭrigos al la muzea centro *Vapriikki*. Tie oni povas laŭ propra gusto viziti diversajn ekspoziciojn (ekz. la finnajn poŝtomuzeon, ŝuomuzeon, glacihokean muzeon, Tampereon en 1918 kaj la bazan urban ekspozicion). La eniropago estas inkluzivita en la aliĝkotizo. La Tagoj finiĝos per komuna lunĉo proprakoste en restoracio *Valssi* de la muzea centro. Post la fermo oni ja rajtas memstare daŭrigi la muzean viziton.

## Aliĝoj kaj kontaktopersonoj

Bv. aliĝi aŭ sendante per poŝto la apudan aliĝilon al EAF aŭ retpoŝte al la adreso *eafmendoj@esperanto.fi* kaj pagante la koncernajn pagojn al la konto de EAF. Memoru uzi **referencnumeron** sen indiki temon de la pago. Bv. noti, ke ne sufiĉas nur sendi la pagon al la konto, ĉar ni bezonas krome scii kiujn programerojn vi partoprenos. Ni mendos la muzean viziton kaj dimanĉan lunĉon laŭ aliĝoj. Ĉiu partoprenanto aranĝu kaj pagu mem sian tranoktadon kaj eventualan lunĉon sabate. Ekzistas sufiĉe multaj kaj tranoktaj kaj manĝejaj alternativoj proksime al la kunvenejo. Membroj de la loka societo Antaŭen volonte donos pliajn informojn laŭbezone.

Vi povas demandi koncernajn aferojn de EAF aŭ de la loka societo jene: la oficialaj kunvenoj: *Tuomo Grundström* kaj *Tiina Oittinen*, programaj aferoj: Tuomo Grundström aŭ *Jukka Laaksonen*, monaferoj: *Tiina Kosunen*, alveno al Tampere, tranoktado kaj restoracioj: Jukka Laaksonen. La kontaktoinformoj de Antaŭen estas sur la antaŭlasta paĝo de la gazeto kaj la informojn de la funkciuloj de EAF vi trovas sur la pago 2.

Bonvolu sekvi informojn sur la retpaĝo: *www.esperanto.fi*

# Talvipäivät 2015

Suomen Esperantoliiton talvipäivät järjestetään Tampereella 7.–8. maaliskuuta 2015. Viime vuosien tapaan viralliset kokoukset järjestetään lauantaina ja sunnuntaina jatketaan epävirallisemmalla ohjelmalla.

Lauantain kokoustilana on *Tampereen kansainvälinen toimintakeskus*, Suvantokatu 13 (n. 300 m rautatieasemalta), joka on yli 20 paikallisen ystävyysseuran yhteinen ”koti”. Paikalla on jälleen sekä liiton että paikallisen yhdistyksen kirjapalvelu. Iltapäivällä järjestetään keskuksen naapurissa, ortodoksisen seurakunnan *Nikolainsalissa* maailmankieli-aiheinen kaikille avoin yleisöluento. Liiton vuosikokouksessa saadaan suuntaviivoja tulevalle toiminnalle. Iltapalan jälkeen jatkamme kongressipitoisella ohjelmalla: muistelemme 20 vuotta sitten järjestettyä Tampereen kongressia ja viime kesän Buenos Airesin kongressia sekä kuulemme ensi kesän kongressista Lillessä ja suunnitelmista järjestää taas uusi esperanton maailmankongressi Suomessa. Illan musiikista vastaa trio *SoilaFE*.

Sunnuntaina kokoonnumme ensin Tampere-talolle verestämään muistoja 1995 kongressista, käymme tuolloin istutetulla esperantopuulla Sorsapuistossa ja jatkamme museokeskus Vapriikkiin, jossa voi mielensä mukaan tutustua sen eri näyttelyihin (esim. Suomen posti-, kenkä- ja jääkiekkomuseot, Tampere 1918 -näyttely sekä kaupungin perusnäyttely). Osallistumismaksu kuuluu päivien ohjelmaan. Ohjelma päättyy omakustanteiseen lounaaseen museokeskuksen ravintola Valssissa. Vapriikissa voi jatkaa itsenäisesti vielä tämän jälkeen.

## Yleisöluento lauantaina 7.3.2015 klo 13

Suomen Esperantoliitto on kutsunut professori Arto Mustajoen Helsingin yliopistosta luennoimaan maailmankieliin liittyvästä aiheesta. Luento *Lingua francat yleisenä ilmiönä* kuullaan Tampereen *Nikolainsalissa* ja se on avoin yleisötilaisuus. Kannattaa suositella ystäville ja tuttaville. (Lue lisää professori Mustajoesta sivulta 5)

## Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä oheinen lomake Suomen Esperantoliittoon tai samat tiedot sähköpostilla osoitteeseen *eafmendoj@esperanto.fi* sekä maksamalla vastaavat maksut liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita viite- tai viestitietoja. Huomaa, että pelkkä maksun lähettäminen ei riitä, sillä tarvitaan myös tiedot siitä, mihin ohjelmakohtiin olet osallistumassa. Paikat sunnuntain museokäynnille ja omakustanteiselle lounaalle varaamme ennakkoilmoittautumisen mukaan.

Majoituksen Tampereella ja mahd. lounaan lauantaina jokainen järjestää ja maksaa erikseen. Tampereella on hyvä valikoima sekä majoitus- että lounaspaikkoja kokouspaikan läheisyydessä. Esperantoseura Antaŭenin jäseniltä saat opastusta tarvittaessa.

Talvipäiviin liittyviä asioita voi tiedustella Esperantoseura Antaŭenin tai liiton toimihenkilöiltä seuraavasti: liiton vuosikokous ja muiden kokousten järjestäminen: Tuomo Grundström ja Tiina Oittinen, ohjelmatiedot: Tuomo Grundström ja Jukka Laaksonen, raha-asiat: Tiina Kosunen. Tampereelle tuloon, majoittumiseen sekä ruokailuihin liittyvät asiat: Jukka Laaksonen. Esperantoseura Antaŭenin yhteystiedot ovat jäsenjärjestösivulla lehden lopussa. Liiton toimihenkilöiden yhteystiedot ovat lehden sivulla 2. Seuraa myös tiedotusta verkkosivulla *www.esperanto.fi*.

Bonvenon – *Tervetuloa*!
*Esperanto-Asocio de Finnlando kaj*
*Esperanto-societo Antaŭen*

# Junulara E-Semajno 2014 en Germanio

Junulara E-semajno 2014 okazis 28.12.2014 – 4.1.2015 en la malgranda orientgermana urbo *Weißwasser* (Blankakvo), kiu situas en Saksio proksime Cottbus/Kotbuso kaj preskaŭ ĉe la germanpola limo. La renkontiĝo havis ĉirkaŭ 150 partoprenantojn el pli ol 20 landoj. Plimulto el la partoprenantoj estis gejunuloj.

Mia vojaĝo komenciĝis en Helsinki-Vantaa flughaveno matene la 28an de decembro dimanĉe. Antaŭkondiĉoj por la vojaĝo ne estis tre bonaj, ĉar mi estis dum la kristnasko malsana kaj havis ankoraŭ unu tagon antaŭ la vojaĝo 39-gradan febron. En la flughaveno mi aŭdis unuafoje en mia vivo, ke oni proklamis per laŭtparolilo mian nomon kaj ordonis veni al la pordego. Ĉe la pordego oficisto de Finnair rakontis, ke nun estas tia situacio, ke la flugkompanio vendis por la flugo pli da biletoj ol en la aviadilo ekzistas seĝoj kaj se ĉiuj vojaĝantoj alvenos, ne ekzistas seĝo por ĉiuj. Oficisto demandis min, ĉu mi povus flugi tra Stokholmo kaj mi respondis jes. Kvin minutojn antaŭ la ekflugo oficisto diris al mi, ke en la aviadilo ekzistas tamen ankoraŭ unu libera seĝo kaj mi rajtis flugi per la rekta flugo al Berlino.

Antaŭ la surteriĝo al Berlino, mi vidis sur la tero neĝon, kio estis suprizo al mi. En Berlino estis kelkaj minusaj gradoj. El la flughaveno mi prenis aŭtobuson al la ĉefa stacidomo. Mi havis la tutan tagon por atendi en Berlino, ĉar mi elektis vojaĝi al Weißwasser kun esperanta karavano. Bedaŭrinde la stacidomo estis malvarma kaj mi ankoraŭ sentis min iomete malsana. Mi pensis ke mi pli volonte atendus nun en flughaveno de Stokholmo. Feliĉe ĉe la stacidomo ekzistis multaj kafejoj kaj vendejoj, kie estis ene varme. La germana parlamento situas proksime al la ĉefa stacidomo kaj mi vizitis la parlamenton. Vespere mi renkontis aliajn karavananojn, kiuj alvenis el Nederlando aŭ okcidenta Germanio. La trajnvojaĝo al Weißwasser iris tra Kotbuso, kie ni devis ŝanĝi la trajnon. Ni alvenis en Weißwasser je la noktomezo kaj ni prenis taksion el la stacidomo al la JESejo. La JESejo situis eble ĉirkaŭ kvin kilometrojn ekster la urbocentro.

En la 29a de decembro lunde vespere okazis Internacia Kulinara Festivalo (IKF), kie partoprenantoj ofertis manĝetojn, sukeraĵojn, trinkaĵojn kaj alkoholaĵojn el ilia propra lando. Mi havis ankaŭ propran tablon por finnaj aĵoj. Tage mi devis viziti vendejon en la urbocentro, ĉar mi bezonis malhaveblajn telerojn kaj glasojn por aĵoj. Feliĉe mi povis prunti biciklon de germana esperantisto por la vojaĝo. Mi kunportis el Finnlando bombonojn, ĉokoladon de *Fazer*, karbonatan trinkaĵon *Jaffa* kaj alkoholaĵojn, ekzemple *Salmiakki Koskenkorva*. Ge-esperantistoj tre ŝatis produktojn el Finnlando kaj post unu horo mia finna tablo estis jam preskaŭ malplena. Vespere estis koncerto de *Jonny M*, kiu faras esperantan hiphopan kaj regean muzikon.

En la 30a de decembro, marde la vetero malvarmiĝis en Weißwasser kaj neĝis. Posttagmeze kelkaj esperantistoj faris neĝviron en korto de la JESejo. Ekstere okazis ankaŭ neĝbatalo. Marde mi partoprenis ankaŭ la unuan parton de TEJO-komitatkunsido kaj prezentis tie la finnlandan asocion FEJO. Dum JES estis ankaŭ kinejo, kie oni montris filmojn en Esperanto aŭ en alia lingvo kun esperantaj subtekstoj. Marde mi rigardis polan filmon Seksmisio (*Seksmisja* en la pola, *Sulatetut miehet* en la finna) el jaro 1984. La filmo estas sciencfikcio kaj komedio, kaj rakontas pri mondo en la jaro 2044, kie restas nur virinoj, sed du viroj vekiĝas post perfrosta dormigado. Laŭ mi la filmo estis tre amuza, kaj poste mi legis en retejo ke la filmo estas en Pollando kulta filmo. Vendrede mi ankaŭ partoprenis la germanan kurson, sed ĉefe la kurso estis tro facila por mi. Vespere mi vi-

zitis trinkejon kaj rimarkis tuj, ke oni ne povas pagi per steloj. Sed por mi, tio ne estis problemo, ĉar laŭ mi, estas pli simple pagi per eŭroj sen unue ŝanĝi la monon al steloj kiel antaŭ du jaroj en Naŭmburgo. En Trinkejo mi konatiĝis kun danaj geesperantistoj, kaj provis paroli ankaŭ la svedan.

En la 31a de decembro merkrede mi partoprenis la polan kurson. La pola kurso vere estis multege pli malfacila al mi ol la germana, ĉar mi neniam lernis la polan. Merkrede mi ankaŭ partoprenis duan parton de la komitatkunsido de TEJO. Vespere oni prezentis venontajn esperantajn aranĝojn, ekzemple Roskilde-festivalon en somero en Danio, IJK aŭguste en *Wiesbaden* kaj SES julie en Slovakio. Vespere estis tradicia silvestra bufedo. Je la deka horo oni deziris feliĉan novan jaron en la rusa kaj oni ludis per laŭtparolilo iun rusan kanton kaj du esperantistoj el Rusio dividis rusajn bombonojn. Je la dekunua horo la germana esperantisto *Gunnar* deziris feliĉan novan jaron en la finna kaj oni ludis per laŭtparolilo finnan kanton. Je la noktmezo oni kalkulis voĉe sekundojn al la jarŝanĝo. Pli malfrue nokte ni havis en trinkejo nordian tablon, kie sidis esperantistoj el Svedio, Norvegio, Danio kaj mi el Finnlando. La vetero varmiĝis kaj la neĝo komencis degeli.

Dum JES organizantoj organizis ekskursojn. Duontagaj ekskursoj okazis al *Bad Muskau* (urbeto proksime de Weißwasser) kaj al la Centro de la soraba kulturo en *Schleife*. La soraba estas minoritata lingvo, kiu estas parolata en tiu regiono. Ekzemple en Weißwasser, ĉiuj stratoj havas ankaŭ nomon en la soraba lingvo. Duontagajn ekskursiojn mi ne partoprenis. Tuttagaj Ekskursoj estis al Berlino kaj al Dresden. Mi elektis partopreni ekskurson al Dresden. La ekskurso estis en la dua de januaro vendrede. En la grupo al Dresden estis ĉirkaŭ 15 partoprenantoj. Matene ni prenis trajnon el Weißwasser tra *Görlitz* al Dresden. En Dresden antaŭ tagmezo ni havis gvidadon en la urbo. Ni vidis famajn konstruaĵojn, ekzemple *Semperoper* kaj *Frauenkirche*. Posttagmeze ni vizitis la germanan Higienan Muzeon kun ekspozicio pri la korpo kaj sano. La vetero en Dresden ne estis bela, ĉar iomete pluvis kaj estis vente. Post reveno al la JESejo vespere, mi rigardis en kinejo la norvegan filmon *La knabino kun oranĝoj* (*Appelsinpiken*, 2009).

Jam tiam, kiam mi unuafoje aŭdis, ke la venonta JES okazos en Weißwasser kaj mi kontrolis en mapo, ke la JESejo situas nur sep kilometrojn for de la german-pola limo, mi decidis, ke mi vizitos Pollandon ĉiuokaze, eĉ se tien ne estus ekskurso. Mi neniam vizitis pli frue Pollandon kaj volis havi novan landon al mia listo de vizititaj landoj. Finfine en la tria de januaro mi faris mian propran ekskurson al *Łęknica*, urbeto, kiu situas sur la german-pola limo. La vojaĝo al Łęknica estis plejparte vojeto tra arbaro kaj daŭris ĉirkaŭ unu kaj duonan horon. En Łęknica estis preskaŭ nur bazaroj, kie oni vendis alkoholaĵojn, tabakojn kaj falsitajn produktojn. La polaj vendistoj ĉe bazaroj estis tre agresivaj kaj provis nepre aĉetigi ion tie. Mi provis serĉi poŝtkartojn aŭ memoraĵojn, sed bedaŭrinde nenie trovis ilin. La nura bela konstruaĵo en la urbeto estis malnova preĝejo. Pollando vere estis senreviĝo al mi. Mia vidpunkto pri Pollando espereble pliboniĝos dum IJK 2016 en Vroclavo. Dum reveno al la JESejo mi vizitis ankoraŭ promenadan ponton inter Germanio kaj Pollando. Ĉe la ponto mi renkontis germanan pensiulan paron kaj komencis paroli kun ili. Ili estis tre amikaj kaj diris, ke ili povas alporti min aŭte al la JESejo, ĉar ili loĝas en Weißwasser. Dum la aŭtovojaĝo ili rakontis al mi pri la situacio de la regiono de Weißwasser, kies regiono regresas kaj junuloj transloĝiĝas for. Mi ŝanĝis kun ili poŝtadresojn kaj ni promesis sendi poŝtkartojn unu al la alia. Mia ekskurso finfine finiĝis bone, kaj mi ne devis reveni al la JESejo en malluma arbaro. Dum la lasta vespero mi aĉetis esperantan flagon, kiun mi nun havas sur fenestro de mia hejmo. Vespere kaj nokte mi estis longe en la trinkejo kaj diskejo.

En la venonta tago mi vojaĝis ankaŭ el Weißwasser al Berlino karavane kun aliaj esperantis-

▶▶

toj. Mia vojaĝo ne ankoraŭ finiĝis en dimanĉo, ĉar mia flugo estis lunde. Mi tranoktis ĉe esperantistino *Luana*, kiun mi konis per skajpo kaj vizaĝlibro jam ĉirkaŭ kvar jarojn, sed ne renkontis ŝin pli frue ol nun en Berlino. Dimanĉe Luana montris al mi *Alexanderplatz* kaj *Brandenburger Tor*. Lunde ni vizitis ekzemple partojn de la malnova Berlina muro ”East side gallery” kaj *Bernauer Strasse*, kie estis pli frue domoj, kiuj situis sur la limo de okcidenta kaj orienta Berlino. Lunde en Berlino pluvis kaj estis plusaj gradoj. Vespere mi flugis al Helsinko kaj hejme en *Hyvinkää* estis multe da neĝo kaj -18 gradoj.

La venonta Junulara E-Semajno okazos 27.12.2015 – 3.1.2016 en *Eger* en Hungario. Eger situas ĉirkaŭ 130 kilometrojn for de Budapeŝto al nordoriento. Mi certe partoprenos, partoprenu vi ankaŭ!

*Tuomas Latva-Pirilä*

# Esperanto-societo en Turku

Esperanto-societo en Turku (EST) havis la laŭstatutan jarkunvenon 1-an de februaro 2015 en la kunvenejo de Civitana instituto de Aurala. Elektitaj funkciuloj:

*Tiina Oittinen*, prezidanto, *Anna-Liisa Ali-Simola*, vicprezidanto, *Leena Tiusanen*, sekretario, *Paula Niinikorpi*, librotenisto, kasisto kaj estrarvicmembro.

Aliaj estrarmembroj: *Paula Harju*, *Anja Launiainen*, *Eeva Nikoskelainen* kaj *Kari Pyykkö*; vicmembroj *Merja Uotila* kaj *Veikko Tikkanen.* Agadkontrolantoj: *Orvo Haavisto*, vice *Ilpo Forsström* kaj honore *Jorma Ahomäki*.

La kunsido dankis la multjaran kasiston kaj libroteniston Veikko Tikkanen kaj bonvenigis la novan libroteniston-kasiston Paula Niinikorpi en la estrara laboro.

Printempe ni havos kiel kutime la kursojn marde en la Civitana Instituto de Aurala. EST partoprenos ankaŭ en aranĝado de praktikaĵoj de la somera kurso samloke. Merkrede ni daŭre renkontiĝas pli-malpli regule en la kafejo Sirius de la ĉefbiblioteko ĉ. inter 16:30–17:30. Kiel ekskursoj estas planitaj vizito en la urbaj muzeoj, ekzemple en la Arta muzeo de Turku kaj piedirado ĉe la riverbordoj. Niaj esperantlingvaj ĉiĉeronoj gvidas vin. Vidu la vidindaĵojn en la reta broŝuro sur la paĝo *www.visitturku.fi*

Gastoj estas ĉiam bonvenaj. Informiĝu ĉe EST-anoj pri datoj, kontaktuloj: sekretario de EST *Leena Tiusanen* (*leena.tiusanen@elisanet.fi*, tel. 050-5757956) aŭ la prezidanto *Tiina Oittinen* (*tiina.oittinen@pp.inet.fi*, tel. 050-5494709). Niajn retpaĝojn vi trovos tra *www.esperanto.fi.*

*Turun Esperanto-yhdistyksen hallituksen jäsenet näet esperantokielisestä osuudesta. Tapaamme kevään aikana tiistaisin Auralan kurssin merkeissä sekä myös lähes viikoittain pääkirjaston kahvila Siriuksessa keskiviikkoisin noin klo 16.30–17.30. Muita tapaamisia ovat vierailut yhdistyksen esperantonkielisten oppaiden kanssa kaupungin eri kohteisiin, mm. taidemuseoon ja muihin kaupungin museoihin. EST osallistuu aktiivisesti Auralan kesäkurssin järjestelyihin.*

*Lue kaupungin nähtävyyksistä myös esperantoksi nettiesitteestä, joka on www.visitturku.fi -sivulla.*

*Vierailijat tervetulleita, varmista kuitenkin aika ja paikka!*

*Lisätietoja antavat sihteeri Leena Tiusanen (leena.tiusanen@elisanet.fi,*
*puh. 050 575 7956) tai*
*puheenjohtaja Tiina Oittinen*
*(tiina.oittinen@pp.inet.fi, puh. 050 549 4709)*
Nettisivumme löydät liiton sivun *www.esperanto.fi* kautta.

# Esperanton kesäkurssi Turussa
# Somera kurso en Turku
# 4.–7.6.2015

Ĉi-jare ni aranĝos la someran kurson en Turku kunlabore kun la *Civitana Instituto de Aurala*. La instruisto estas la al ni konata *Patrik Austin*. La kurso estas celita al komencantoj, progresantoj kaj al ĉiuj, kiuj volas havi someran renkonton en Turku kaj samtempe lerni pli. Notu, ke en la finnlingva kursoreklamo en la retpaĝoj de Aurala oni aparte emfazas la komencantojn kaj alvokas ilin partopreni, sed ĉiuj estas nature bonvenaj! Instruado estas ĉiutage 5–6 horojn kaj krome ni konatiĝos kun la vidindaĵoj de la urbo kun esperantlingvaj ĉiĉeronoj. Kursokotizo estas 90 eŭrojn, kio enhavas la materialon de la instruisto kaj kafon en la kursejo ĉiutage. Eblas ankaŭ partatempa vizito al la kurso. Ĉiu prizorgos mem la tranoktadon kaj manĝojn kaj ni en Turku helpas vin kun tio. La kurso estas aranĝata kunlabore kun *Auralan kansalaisopisto*, *Esperanto-societo en Turku*, *EAF* kaj *ELFI*.



Patrik Austin




Aurala

Pliajn informojn donas la sekretario de EAF: Tiina Oittinen, tel. 050 549 4709, *eafsekretario@esperanto.fi*

*Tämänkesäinen liiton kesäkurssi järjestetään Turussa yhteistyössä Auralan kansalaisopiston ja Turun Esperanto-yhdistyksen sekä ELFIn kanssa. Opettajaksi saamme Patrik Austinin, joka nykyään asuu Edinburghissa. Kurssi räätälöidään osallistujien mukaan, joten kaikki varmasti oppivat uutta kuten aina kesäkursseillamme. Mukaan toivomme tietenkin myös aivan alkeista aloittavia. Kurssimaksu on 90 euroa ja siihen sisältyy opettajan materiaali sekä kahvi opistolla päivittäin. Myös vierailu kurssilla on mahdollista. Majoituksen ja ruokailut kukin maksaa itse ja me turkulaiset autamme sopivien paikkojen löytämisessä.*

*Lisätietoja antaa liiton sihteeri Tiina Oittinen, puh 050 549 4709, eafsekretario@esperanto.fi*

Informoj: *www.aurala.fi* kaj *www.esperanto.fi*

# Telma Rio de Janeirosta ja Bruno Turusta

Turkulainen Bruno Lehtinen harkitsi vuonna 2009 vierailua Brasiliassa. Pasporta Servon osoitteisto ja Universala Esperanto-Asocion vuosikirja auttoivat yhteyden avaamisessa. Bruno lähti matkaan ja sai Riossa oppaakseen Telma Oliveira Ribeiron, joka tarjosi vieraalleen myös majoituksen. Yhteinen kieli oli tietysti esperanto, joka kummaltakin heiltä soljui sujuvasti. Noin kerran vuodessa ystävykset vierailevat toistensa luona. Molemmat ovat koulutukseltaan opettajia. Paikalliset yhdistykset Riossa ja Turussa jäsenineen ovat aina saaneet kuulla heiltä molempien maiden tuoreimmat esperanto-uutiset ja tärkeimmät tapahtumat. On miellyttävä todeta, kuinka helposti portugalinkielinen keskustelee suomalaisen kanssa. Sanakirjojen apua tuskin tarvitaan. Puhutaan paljon maahanmuuttajien kieliongelmista. Tiedämme esperanton sopivan mainiosti avuksi vieraan kielen opettelemisessa. Telma oli vuoden 2014 lopulla taas kerran kuukauden päivät Suomessa Aurajoen rannoilla. Tammikuussa kuluvana vuonna 2015 Bruno lensi Rioon ja viipyy Brasiliassa kolme kuukautta. Skype-kontaktit helpottavat yhteydenpitoa. Olen monta kertaa tavannut Telman ja Brunon Turussa. Heidän seurassaan viihtyy ja virkistyy, kun huomaa esperanton toimivan tavallisten ihmisten arjen askareissa erittäin vaivattomasti.



**Telma Oliveira Ribeiro kaj Bruno Lehtinen**

*Jorma Ahomäki*

## Greziljono invitas

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj dum ĉiuj sezonoj, kun E-kursoj kaj aliaj aktivaĵoj:

- **2015-apr-03/08: Renkontiĝo de** *Interkant'* **kaj kunkantado kun** *La Kompanoj* **–** *www.gresillon.org/spip.php?article140*
- **2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun** *Zs. Kórody*, *Ch. Chazarein*, *M. Quenut* **–** *www.gresillon.org/printempas*
- **2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) –** *www.gresillon.org/printempas*
- **2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso –** *www.gresillon.org/s2*
- **2015-aŭg-01/08: Lingva semajno, Lingvofestivaleto, tuj post UK –** *www.gresillon.org/s3*
- **2015-aŭg-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj –** *www.gresillon.org/s4*
- **2015-oktobro-17/25: AŬTUNE, lingva seminario kun** *Christian Rivière* **k.a.**

Jara agendo/kalendaro en *www.gresillon.org/agendo*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti *eafgazeto@esperanto.fi*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@he*lsinki.fi(Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 *onni.kauppinen@pp.inet.fi*
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 💻 *kimmo.hannula@creavit.fi*, *www.esperanto.fi/jyvaskyla*
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala 💻 *www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com*
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla 💻 *matti.wallius@ebaana.net*
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperanto-societo Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. 💻 *www.esperanto.fi/tampere* (Jukka Laaksonen: *jvaleto@kolumbus.fi* ☎ 050 5829 248)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 *tiina.oittinen@pp.inet.fi* ☎ 050 5494709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. 💻 *sylvia.h@kolumbus.fi* ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 🖷 (09) 660 651 💻 *steleto@pp.inet.fi*
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *fejo@esperanto.fi*. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). 💻 *esperarto@phnet.fi*.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti *jormato35@gmail.com.*

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2015**

| Nro | Limdato | Aperas |
|---|---|---|
| 2/2015 | 31.3. | en aprilo |
| 3/2015 | 31.5. | en junio |
| 4/2015 | 1.9. | en septembro |
| 5/2015 | 15.11. | en decembro |

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

| Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 EUR | 1/1 sivu/paĝo 50 EUR |
| 1/2 sivua/paĝo 60 EUR | 1/2 sivua/paĝo 30 EUR |
| 1/4 sivua/paĝo 40 EUR | 1/4 sivua/paĝo 20 EUR |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: *eafgazeto@esperanto.fi* aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

BA2
Itella Posti Oy

Itella Green




## Kutsu Suomen opettajien esperanto-yhdistyksen vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n (ELFI) sääntömääräinen vuosikokous pidetään 7. maaliskuuta 2015 klo 10.30 alkaen Tampereen kansainvälisen toimintakeskuksen tiloissa (osoite: Suvantokatu 13, Tampere). Käsitellään vuosikokoukselle kuuluvat asiat sekä Muissa asioissa ehdotus ILEI:lle valita *Zsófia Kóródy* ILEI:n kunniajäseneksi. – Kaikki jäsenet tervetuloa!

Kunvoko al la jarkunsido de ELFI
Laŭstatuta jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) okazos sabaton la 7-an de marto 2015 je la 10.30 en la Internacia agadcentro (adreso: Suvantokatu 13, Tampere). Estos traktataj laŭstatutaj jarkunsidaj aferoj kaj en la punkto Eventualaĵoj la propono al ILEI elekti *Zsófia Kóródy* kiel honoran membron de ILEI. – Ĉiuj membroj estas bonvenaj!

*La estraro*

## Karavano al Lillo BL5 – Karavaani BL5 Lilleen

La karavano realiĝos je 22.7.–4.8.2015 tra Turku-Naantali-Kapellskär-Malmö-Travemünde-Lille. Ni estas nun 15 personoj, do estas loko por pliaj. Informiĝu ĉe la sekretario.

*Yhteinen bussimatka Lilleen toteutuu viidentoista henkilön kanssa, mutta mukaan mahtuu vielä. Tiedustele yksityiskohtia ja hintaa liiton sihteeriltä.*

Bonvenon al la karavano BL5 – *Tervetuloa BL5 bussikaravaanimatkalle!*

*Tiina Oittinen*, sekretario de EAF, *liiton sihteeri*
*tiina.oittinen@pp.inet.fi*, tel. 050-5494709.

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Aineisto 31.3.2015 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 31.3.2015 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <*eafgazeto@esperanto.fi*>.

Kopio Niini, Tampere 2015